



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 5
1975

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo
42-a (51-a) jaro
Dumonata

Tria Universala Kongreso en Kopenhago

Ĝis la lasta tago de la kongreso en Nürnberg neniu ordinara kongresano sciis ĉu okazos iu kongreso en 1975. En la ferma kunveno ni eksciis ke la kongresurbo de 1975 nomiĝas Kopenhago, kaj ke la nova LKK jam komencis siajn laborojn. Oni sin demandis: Sed kun tiel mallonga tempo de preparo, ĉu tiu kongreso sukcesos? Mallonge dirite: Ĝi sukcesis!

En sia parolo al la kongreso en la ferma kunsido en Kopenhago nia prezidanto Humphrey Tonkin tuŝis la demandon, kiel la Esperanta historio preparolos la 60-an Universalan Kongreson. Li menciis diversajn nomojn per kiuj partoprenintoj eble karakterizus ĉi tiun kongreson: suna, harmonia, amika, labora, refortiga kongreso. Iu alia parolis pri la novstila kongreso.

En la programo de la Kopenhaga

kongreso ni retrovis la bone konatajn tradiciajn elementojn; sed en multaj unuopaj programeroj ni trovis ion novan.

Ekzemple la kongresoj ĉiam kutimis komenciĝi per longa-multaj dirus: longega - «Inaŭguro». En Kopenhago ni havis unu du-horan «Inaŭguron», kaj post du-hora libera tempo iom malpli longan «Malfermon». En la unua parto ni aŭskultis salutojn de reprezentanto de la Dana kulturministro, vicurbestro de Frederiksberg, urbestro de Kopenhago kaj paroladon de Flora Szabo-Felsö, estraranino de UEA, okaze de la Internacia Jaro de la Virinoj. Poste salutadis la reprezentantoj de ŝtatoj. Por Norvegio salutis Rolf Bugge-Paulsen konforme al la tradicio. Cetere pli multaj ŝtataj salutoj estis prezentataj de diplomati-

(daŭr. p. 69)

Sciigoj de N.E.L.

61-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Ateno, Grekujo, 31. Julio — 7. Aŭgusto 1976. Aliĝojn kaj mendojn peros Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1, poŝtĝirokonto 1.00.32. Oni petas, ke ĉiuj norvegoj, kiuj pripensas partoprenon en la kongreso, baldaŭ anoncu sin al la Turisma Servo, por ke oni vidu, ĉu estas bazo por aranĝi komunan vojaĝon, ĉu per aviadilo, ĉu alimaniere.

Ĉefdelegito de U.E.A. Pro la forpaso de s.ro Skyberg bonvolu plu ne sendi kotizojn al lia adreso. La Estraro serĉas novan Ĉefdelegiton kaj informos pri la nova adreso laŭeble baldaŭ per cirkulero kaj per Norvega Esperantisto.

Ges.roj Philip. Montrante al nia cirkulero de la 17a de Junio 1975 ni informas, ke la plano nun estas, ke ili venu al nia lando nur dum la vintro, eble en Januaro-Februaro. Ni petas ĉiujn klubojn kaj rektajn membrojn, kiuj deziras viziton de ili, anonci sin al N.E.L. laŭeble baldaŭ, por ke ni sufiĉe frue povu starigi definitivan planon pri ilia vojaĝo en Norvegujo.

La Oficeja Fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj donacintoj al tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj.

Kampanjo Reisæter. Ni ankaŭ memorigas pri tiu tre grava ekonomia kampanjo, kies celo estas doni al la Estraro iom pli liberajn manojn en la laboro por Esperanto en nia lando.

Taskotabelo por kluboj. — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ekzigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas al ĉiuj klubanoj pagi la kotizon por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Korekto al la protokolo pri la landa kunveno: Sub punkto 5, sub punkto 2) elfalis: La propono estis unuanime aprobata.

La Liga Estraro.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro:

Hans Amund Rosbach
Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio:

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj: la 20.
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: $\frac{1}{1}$ p. kr. 150, $\frac{1}{2}$ p. kr. 75,
 $\frac{1}{4}$ p. kr. 40, $\frac{1}{8}$ p. kr. 20.

Malfruigo

La kvina numero de N.E. devus aperi en la komenco de oktobro. Tio ne povis okazi — ĉar jam en la mezo de septembro mi forlasis Norvegujon por studvojaĝo al Germanujo kaj Svedujo, kaj revenis nur en la mezo de oktobro. Kaj je mia forvojaĝo ankoraŭ ne estis tempo por prepari ion ajn, nur la multajn detalojn rilate al la studvojaĝo. Tial, karaj legantoj, mi petas vian indulgon kaj komprenon.

*

Vi ankaŭ trovos, ke en tiu numero la «Fervojista Paĝo» fariĝis du-paĝa. Kaj vi certe memoras, ke en la pasinta numero ne estis fervojista paĝo. Ankaŭ tio dependas de la materialo al la paĝo, ĝi ne alvenis al mi pro malsano de la redaktoro de la paĝo. Certe vi ankaŭ komprenas — kaj pardonas.

*

Nia numero 5 enhavas pli ol ordinare korespondpetojn. La aŭtuno kaj

vintro estas sezono por korespondo, tio estas unu el la kaŭzoj. Ordinare ni uzas la korespondpetojn laŭ la eblecoj, kaj ofte ni devas ellasi ilin pro alia materialo. Tial ni havas plurajn ankoraŭ nepresitajn. Kaj ni decidis, en tiu ĉi numero proponi al vi plej vastan eblecon elekti novan plumamikon.

Poŝtkarto de d.ro Zamenhof

De tempo al tempo diversaj Esperanto-gazetoj publikigas retrovitajn leterojn aŭ poŝtkartojn de d.ro L. Zamenhof. Antaŭ nelonge s.ro Jean Amoureux en Perpignan, Francujo, havis la bonŝancon ricevi originalan poŝtkarton de D.ro Zamenhof, kies teksto, laŭ lia scio, neniam estas publikigita, kaj li donis la Norvega Esperantisto permeson publikigi ĝin. Temas pri saluto al la unua scienca Esperanto-revuo:

Adresflanko:

Al Sro P. Fruictier
27 Boulevard Arago
PARIS
France.

Tekstflanko:

Dr. L. ZAMENHOF
Warszawa, ul. Dzika No. 9 2/III 04

Kara Sinjoro!

Mi ricevis kun plezuro la unuan numeron de la «Internacia Scienca Revuo» kaj mi sincere deziras al la Revuo la plej bonan sukceson.

Kun kora saluto

via
L. Zamenhof

Vi starter 10-kronerulling til Propagandafondet!

Norsk Esperanto-Forbund har som kjent et propagandafond, men det er altfor lite til at Forbundet kan drive noen effektivt propaganda.

I statuttene for fondet heter det at inntil fondet når kr. 5000 kan bare rentene brukes, men når fondet kommer over denne sum, kan man bruke også av det overskytende beløp. — Ifølge regnskapet for 1974 er fondet på kr. 11547. Dessverre er dette beløpet ikke disponibelt, fordi man har lånt av det til trykking av de nye brevkursene.

Derfor setter vi nå i gang en 10-kronerulling, og håper at oppslutningen blir 100 %! Se godt etter om du er utfordret, og betal med glede din tier. Du kan betale selv om du ikke er utfordret! og du trenger ikke selv utfordre noen. Her er også mulighet for å verve sympatisører som ikke er medlemmer til å bli med i aksjonen.

De første tierne er kommet inn, vi gjengir listen nedenfor. Bli med du også!

La kontorfondajo

Pli frue	kr. 1277,00
Oluf Olsen	» 50,00
C.S.B.	» 20,00
Odd Kolbrek	» 25,00
	kr. 1372,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Adressen: Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Centrum, Oslo 1, postgiro 1.00.30. — Skriv Propagandafondet bakpå talongen, og skriv samtidig navnet på den/dem du utfordrer.

Elna Matland
Forbundsrådsmedlem

Navneliste nr. 1 over del- takere i 10-kronerulling

Ingeborg Rekve bet. kr. 10, utfordrer Trygve Reisæter.

Johan Rekve bet. kr. 10, utfordrer Jenny Jahren.

Ingrid Matland bet. kr. 10, utfordrer Kristian Sivertsen.

Norman Birkeli bet. kr. 10, utfordrer Karen Berge og Ida Veka.

Robert Rødsås bet. kr. 10, utfordrer Olav Thormodsen.

Arthur Bjerke bet. kr. 10, utfordrer Vigdis Kvalvaag og Sigmund Blikshavn.

Johan Matland bet. kr. 10, utfordrer Erling Anker Haugen og Nils Ulne.

Elna Matland bet. kr. 10, utfordrer Per Johan Krogstie og Jarmila Šestakova.

Eva Matland bet. kr. 10, utfordrer Sigurd Sørensen.

Olav Andersen bet. kr. 10, utfordrer Vašek Šestak og Steffen Kjetland.

Korespondu!

56-jara svedo deziras korespondi kun esperantistinoj pri ĉiuj temoj, ankaŭ interŝanĝas bildkartojn kaj fotojn. — S.ro Jan Vedevek — Poste restante, 40101 Göteborg I, Svedlando.

Tria Universala Kongreso en Kopenhago

(daŭr. de p. 65)

aj reprezentantoj parte en Esperanto, parte en nacia lingvo kun interpretisto. En Esperanto parolis la Greka aferŝarĝito, kiu invitis al venontjara kongreso en Ateno. Du malgrandaj anoj de de la Infana Kongreseto salutis la grandan kongreson, kaj 28 infanoj el 8 landoj defiladis antaŭ la aplaudanta kongresanaro.

En la malfermo ni aŭdis salutojn de landaj asocioj. Por Norvega Esperantista Ligo salutis Otto Prytz. La kongresmalferman paroladon faris Humphrey Tonkin. Tiu parolado certe aperos en Revuo Esperanto kaj en Heroldo de Esperanto kaj estas tre leginda. Sub gvidado de parlamentano Einar Dahl la kongresanoj starante kantis la Himnon.

Alia nova aranĝo estis ke la Somera Universitato ampleksis ne nur prelegojn sed ankaŭ seminariajn grupajn kunsidojn. Por ĉeesti tian seminarion oni devis skribe peti permeson. Tia seminario daŭris iom pli longe ol prelego kaj parte konsistis el neformala diskutado inter profesoro kaj ĉeestantoj. Kiel Norvego oni kontente konstatis, ke Carl Støp-Bowitz plene kaptis la atenton de siaj aŭskultantoj per la prelego «La natura ekonomio de la maro.»

Tria nova aranĝo estis: Du oficialaj akceptoj. Tian duobligon oni tamen ne povos ofte ripeti en estontaj kongresoj. Ĉiu kongresano ricevis invitilon, aŭ por la urbodomo de Kopenhago aŭ por la urbodomo de Frede-

riksberg. En ambaŭ akceptoj regis granda etoso. Oni interŝanĝis afablajn paroladojn, ĝuis abunde da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en belaj ĉirkaŭaĵoj, kaj laŭ reciprokaj raportoj en la vespero ĉiuj estis tre kontentaj pri tiu akcepto al kiu ili estis invititaj.

En ĝisnunaj kongresoj la komisionoj de la Komitato, kiuj preparas proponojn por la Komitata pritrakto de diversaj aferoj, havis siajn diskutuojn en fermitaj kunsidoj. En ĉi tiu kongreso ĉiu kongresano rajtis ĉeesti kaj aŭskulti la diskutojn de la komisionoj — pri turismo, eksteraj rilatoj k.t.p. Unu komisiona kunsido — pri statuto de UEA — estis aranĝita por publika diskutado pri la ĉefaj principoj de nova statuto de UEA.

Speciala diskutkunveno temis pri *La rolo de la individuo en la Esperanto-movado*. La temo mem reprezentis novan tendencon en la enhavo de ĉi tiu kongreso, sed ankaŭ la teknika aranĝo estis io tute nova: En la plej granda kongreseja salono, salono Zamenhof, estis starigitaj 19 grandaj, vere grandaj, rondaj tabloj. Laŭ trafiksignoj ĉiu tablo estis rezervita por diskutado de unu ĉefa temo de la Esperanto-movado, ekz.: «Esperantopolitiko», «Financoj kaj donacoj», «Kongresoj kaj konferencoj», «Instruado», «Turismo», «Revuo». Ĉe la unuopaj tabloj unue okazis grupa diskutado pri la temoj. Poste okazis komuna diskutado kun raportoj pri la diskutoj ĉe la unuopaj tabloj.

Nova aranĝo estis ankaŭ *Publika kunveno kun redaktoroj* de Revuo Esperanto kaj Heroldo de Esperanto. Simo Milojević kaj Ada Fighiera-Sikorska je unu flanko de la tablo

renkontis la legantarojn je la alia, rakontis iom pri redaktoraĵoj taskoj kaj invitis demandojn kaj opiniojn. La salono estis pli ol plena kaj la diskutado vigla. Mi antaŭvidas similajn kunvenojn en estontaj kongresoj, espereble en pli grandaj salonoj.

Nova organizaĵo en la Esperantomovado, *Societo Zamenhof*, havis sian unuan kunsidon. Ĝia iniciatinto, Humphrey Tonkin, parolis pri ĝiaj taskoj kaj pri ĝia ĝisnuna evoluo kaj esperis ke la membronombro daŭre kreskos por la bono de la financoj de UEA.

Kiel en antaŭaj kongresoj la *Komitato de UEA* havis longan tagordon por prilabori en siaj kunsidoj dum la kongreso. La lasta kunsido ankoraŭ daŭris kiam Sabatan matenon la kongresanaro pli malpli pacience atendis malfermon de la ferma kunveno. Kiel kutime la kunsidoj de la Komitato estis malfermitaj al ĉeestantaj kongresanoj, kaj la nombro de ĉeestantoj ĉiam estis konsiderinda. La intertraktado en la Komitato okazadis en bona harmonio kaj estis faciligita per tio ke la elektitaj raportantoj Ulla Luin kaj Renato Corsetti zorgis pri sinsekve multobligitaj seneraraj raportoj, tiel ke la komitatanoj ne bezonis perdi tempon per komuna protokolo dum la kunsidoj.

Inter specialaj temoj pritraktitaj de la Komitato en ĉi tiu kongreso estas: Nova financa programo
La internacia jaro de la virino
Elekto de sep novaj honoraj membroj
Nova volontula servo de UEA
Plisimpligo de membrokategoriasistemo
Politika neŭtraleco de UEA

Kiel en ĉiu Esperanta kongreso estis necese por unu kongresano ĉeesti eĉ duonon el tio kion oni trovas en la kongresa programo. Ĉiu devas mem substreki tion kion ŝi aŭ li volas ĉeesti — kaj tamen oni ofte perdas ion. En mia programo estis streko sub la kristana diservo, kie mi aŭdis Norvegan pastron paroli al multaj nacioj en komuna lingvo, sed en lasta minuto mi devis rezigni pri tio pro eksterprograma komisiona kunsido. Ankaŭ en ĉi tiu raporto pri miaj impresoj de la kongresoj certe mankas multaj eroj kiuj devus ne manki; sed se oni volus ĉion raporti el la kongreso, eĉ kelkaj numeroj de Norvega Esperantisto ne sufiĉus. Tial mi esperas ke vi estas abonanto de *Revuo Esperanto* aŭ de *Heroldo de Esperanto* aŭ de ambaŭ — aŭ mendos abonon nun, tiel ke vi povos legi pli pri la 60a Universala Kongreso de Esperanto.

Ankaŭ en la vesperoj ne mankis programeroj. Sabate ni havis *Interkonan vesperon* en du etaĝoj de la kongresejo, konatiĝis kun novaj amikoj kaj revidis malnovajn, — kaj konatiĝis kun Dana kafo kaj aliaj trinkaĵoj kaj kun Esperanto-kantaro presita por la kongreso. Dimanĉe ni amuziĝis en *Tivoli*, kie nia kongresinsigno donis liberan eniron tiun vesperon. Lunde okazis la *Kongresa Balo*. Marde estis *Dana vespero*, kiam la veraj Pieroto, Kolumbina kaj Arlekeno el la Pantomima Teatro de Tivoli prezentis baledon. Kiam la prezentado finiĝis per alparolo al la kongresanaro en preskaŭ-Zamenhofa Esperanto, la aplaŭdado tondris. Merkrede estis *pupteatra prezentado* de

Roberto Banky el la Hungara ŝtata Pupteatro kaj unupersona teatraĵo «*Maria Curie*», majstre prezentita de Jadwiga Gibezyńska. Jaŭdon en *Internacia arta vespero* ni povis ĝui muzikon kaj kantadon de Margaret Hill kun edzo kaj filino kaj kantadon de Veselin Damjanov; la lastan duonon de la vespero Svisa muzikistino Danielle, kiun ni renkontis ankaŭ en kelkaj aliaj aranĝoj dum la kongreso, nin kondukis en vagado tra la mondo ludante al ni per multaj diversaj, grandaj kaj malgrandaj instrumentoj, kiujn ŝi iom post iom aperigis el siaj kofro kaj dorsosako. Vendredon *Bulgara Esperanto-Teatro* prezentis la komedion «*La Servisto de du Mastroj*» de Carlo Goldoni. La disdonita teatra programo enhavis folion kun peto ke oni skribu mallonge sian opinion pri la prezentado kaj donu ĝin je la eliro el la teatro. Neniu kolektis tiajn foliojn, kaj la kaŭzo estis evidenta: post preskaŭ senfina aplaŭdado neniu bezonis foliojn por pruvi la sukceson.

En la ferma kunsido la prezidanto nomis la sep membrojn kiujn la Komitato unuanime elektis *honoraj membroj de UEA*, kaj la ĉeestantaj el ili estis petataj veni sur la podion. Inter la novaj honoraj membroj estas nia Norvega prezidinto Rolf Bugge-Paulsen, preskaŭ Norvega samideano Madelaine Haudebine kaj nia najbarlandano parlamentano Einar Dahl. La ceteraj kvar estas Atanas Atanasov, Hilda Dresen, Mark Starr kaj Mieczyslaw Sygnarski.

La kongresa flago estis transdonata al la ĝenerala sekretario de Helena Esperanto-Asocio. Sur la flago estas

surkudritaj la nomoj de ĉiuj kongresurboj de niaj universalaj kongresoj post la dua mondmilito, interalie Oslo 1952. Venontjare ĝi ornamos la podion de la kongresejo en Ateno, — kaj la postan jaron vi povos vidi ĝin en Reykjavik.

Humphrey Tonkin per bato de la prezidanta martelo signis la finon de la kongreso, kaj denove la kongresanoj — denove sub gvido de Einar Dahl — starante kantis la himnon En la mondon venis nova sento.

En la komenco mi menciis kelkajn nomojn per kiuj la historio eble karakterizus la trian Universalan Kongreson en Kopenhago. Elirante el la salono post la ferma kunsido mi aŭdis el ie en la homamaso ankoraŭ unu nomon, eble la plej ĝustan:

La kongreso kiu plaĉis al ĉiuj!

Ludvig Anjer

Letero de Lapenna

Estimata Redaktoro,

Sur p. 51 de NE n.ro 4/1975 vi menciis la Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Saarbrücken kaj asertis, ke en Hamburgo mi perdis mian pozicion. La vero estas, ke dum la UK en Hamburgo mi perdis nenian pozicion, sed, konstatinte la sukceson de la kontraŭneŭtraleca konspiro en UEA en la elekto de komitatanoj C, mi ekigis el ĉiuj funkcioj en UEA, inkluzive la honoran membrecon.

La kaŭzoj, kiuj devigis min al tiu paŝo estis prezentitaj en la adiaŭa

(daŭr. p. 75)



ALFRED SKYBERG forpasis

Por ĉiuj liaj amikoj estis ŝoka la informo pri la forpaso de Alfred Skyberg la 6an de Septembro, post kelktempa malsano.

Alfred Skyberg naskiĝis en Gjøvik la 30an de Julio 1910, kaj li fariĝis do nur 65-jara. Li esperantistiĝis en 1934, fondis samjare Esperantoklubon en Gjøvik, kaj estis ĝia prezidanto 1934—36. Post kiam li transloĝiĝis al Oslo, li baldaŭ aktiviĝis en la Esperanto-movado tie. Li estis ĝenerala sekretario de N.E.L. 1950—1955, vicprezidanto de Klubo Esperantista en Oslo 1952—1956, estrarano de Orienta Distrikto de N.E.L., membro de la L.K.K. de la 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo 1965. En tiuj jaroj li ankaŭ multe vojaĝis profesie en nia lando kaj ĉiam vizitis la esperantistojn, kio grave kontribuis al ilia aktivado.

Dum la lastaj jaroj li aktivis precipe por U.E.A. kaj por la Eldonejo Esperanto A/S. Li estis Fakdelegito de U.E.A. de 1948 kaj Cefdelegito por Norvegujo de 1957. Prezidanto de la Eldonejo li estis de 1961. Pro sia multflanka agado li estis Kavaliro de la 1-a klaso de PRO MERITO.

Alfred Skyberg havis kvietan naturon, sed liaj vortoj havis pezon, kiam li parolis. Li prefere laboris senbrue, kaj des pli li sukcesis fari. Li estis fidela kaj helpema amiko, ĉiuj, kiuj lin konis, povis nur ami kaj profunde respekti lin. Ni deziras pacon al lia memoro kaj esprimas

Esperanta semajnfino

la 12., 13. kaj 14. de Decembro 1975
en LONDONO, BRITUJO

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredo

20.00—24.00 Interkona Vespero

Sabato

antaŭ- kaj posttagmeze: libertempo por butikumi (la butikoj en Oxford Street restas malfermitaj dum la tuta tago.)

samtempe: diversaj seminarioj por viroj, aktivul(in)oj kaj malbutikumuloj.

vespere: 19.30—24.00: Zamenhofa Bankedo kaj Balo.

Dimanĉo

11.00 «Esperanto ĉe la oratora angulo en Hyde Park»

13.00 Komuna Lunĉo

15.00 Diservo en la Franca Protestanta Preĝejo, Soho Square

16.00 Adiaŭoj

Aliĝkoto nur £ 5.50 aŭ egalvalor. Loĝado en la Hotelo «Washington» kostas £ 5.50 por persono por nokto kun matenmanĝo en du-lita ĉambro kaj £ 6.00 en unu-lita ĉambro.

Petu aliĝilojn de

Brita Esperanto-Asocio
140 Holland Park Avenue,
London W 11 4UF Britujo

nian profundan kunsenton kun liaj edzino kaj filo.

En la nomo de liaj multnombraj amikoj

C. Støp-Bowitz

Vizito en la Esperanto Muzeo en Vieno

En oktobro ni pasigis unu semajnon en Vieno. Jam antaŭ ol ni alvenis tien, ni decidis ke ni volos viziti nian fame konatan internacian muzeon.

La muzeo estas lokita, kiel vi certe scias, en Hofburg, la konata kastelo en Vieno, kie ankaŭ situas multaj aliaj muzeoj. — Ĉar Hofburg estas grandega, eble estus malfacile trovi ĝuste nian muzeon! Sed en la turisma broŝuro pri Vieno oni priskribas ĉiujn muzeojn, i. a. ankaŭ «nian», kaj oni informas ke vi devas eniri ĉe Michaelisplatz. Enirante laŭ la indiko ni tre facile trovis. La direktoro de la muzeo, ŝtatbibliotekisto dr. W. Hube, afable bonvenigis nin, kaj kun granda intereso kaj admiro ni ĉirkaŭiris rigardante librojn, memoraĵojn, broŝurojn, bildojn, buston de Zamenhof kaj multon alian. — Fine ni skribis nomojn en gastlibro. La direktoro rakontis ke vizitas la muzeon inter 200 kaj 500 homoj ĉiujare, el kiuj proks. 90 % estas ne-esperantistoj!

Ni ja ofte kaj multe aŭdis kaj legis pri la muzeo, sed nur nun trovis okazon viziti ĝin. Vere valoris la vizito, la muzeo estas altkvalita, kaj la lokigo en la kastelo Hofburg garantias la nivelon. La aŭstria ŝtato garantias daŭran konservadon de la akirita materialo!

Oni povas aboni la Informilon de la muzeo por 10 norvegaj kronoj jare por sekvi la staton kaj evoluadon de ĉi tiu unika Esperanto-institucio.

Ne preterlasu la okazon viziti la Internacian Esperanto Muzeon se vi estas en la aŭstria ĉefurbo!

Elna kaj Johan Matland

Recenzo

DAŪRIGA KURSO

Esperanto 2. Verkis: Olav Rygg.
Eld. Norvega Esperantista Ligo.

La kajero estas kolekto de la daŭriga leterkurso, kiun eldonis NEL kunlabore kun Folkets Brevskole, nun eldonita kiel libro, kiel ankaŭ la 5 unuaj leteroj de la sama leterkurso.

Kiam mi traegis la unuan parton, tuj kaptis min la tre bona klarigo de la gramatiko, tiel klara, ke norvegoj profitus trastudi la esperantokurson por lerni sian propran lingvon. La dua parto de la kurso estas samspeca, sed ties valoro tamen estas la enkonduko al pli supra ŝtupo de lingvoscio Esperanta. En la libro oni trastudas la partecan demandon. Min neniam afliktis la problemo de atismo aŭ itismo, kaj, vere, mi eĉ ne klare scias, kiu estas kiu. Sed la libro de Olav Rygg donas klaran enkondukon en la demandon, kaj laŭ mia kompreno la logikan klarigon de la variaj esprimoj:

La letero estas skribata: Oni nun skribas, la letero ne estas finskribita.

La letero estis skribata: Oni skribis, sed ĝi ne estis finskribita.

La letero estas skribita: Oni fin-skribis la leteron.

La letero estas skribota: Oni komencos skribi. ktp.

La libro ne estas granda. La lecionoj estas skribitaj per facila kaj klara lingvo, kaj la ŝtupoj estas ne tro altaj, tamen kondukas al bona lingvoscio. Laŭ mia opinio ĝi estas tre taŭga, por memstudo kiel por kursoj.


Haro

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Redaktoro: Odd Kolbrek



El Bulteno de la Aŭstria Federacio Esperantista Fervoja ni citas:

Tabuloj de «Esperanto-servo» en la stacidomoj

Estas nia tasko varbadi por Esperanto, instrui Esperanton kaj zorgi pri ĝia aplikado. Tre bonan kaj efikan formon pri la praktika aplikado de la internacia lingvo trovis la esperantistaj fervojistoj (laŭ iama iniciato de s.ro Bürger en Linz/Donaŭ) per lokiĝo de tabuloj: ESPERANTO-SERVO en diversaj stacidomoj. Sed estas necese, ke la nombro de la staciejoj, en kiuj troviĝas tiuj tabuloj, konstante plimultiĝu. La fervojistoj volonte zorgos pri tio, nur ili bezonas subtenon de la gesamideanoj kiuj konsentas esti anoncataj kiel «servanto» sur tiuj indikiloj.»

Laŭ mia opinio la ekzemplo de Aŭstrio estas imitinda ĉie en la mondo, interalie ĉe ni en Norvegio. Dank' al pozitiva sintenado de NSB, la fervojo anoncas tutpaĝe kaj klarvideble pri siaj servoj en la Jarlibro de UEA, kaj estas eldonitaj 2 belaj kaj instruicaj broŝuroj, klariga teksto al la internaciaj figuroj en eltiraĵo de la horaro, cetere filmo kun teksto en Esperanto. La sekvo de tio estas, ke la intereso por vojaĝoj en Norvegio

kreskis eksterlande. Multaj eksterlandaj gesamideanoj turnas sin per leteroj skribitaj en la internacia lingvo al NSB kun peto pri informoj, kaj ĉar neniu en la Informoficejo de NSB regas Esperanton, oni de tie ekspedas la poŝtaĵojn al mi, por ke mi respondu ilin. Sed, ĉu tio estas sufiĉa? Mi opinias, ke ne. Kiam en sia vico la fremdlandaj turistoj alvenos, ili bezonas kontakton kun esperantistoj en la urboj kaj lokoj dise en la lando. Pensu mem, ke vi malfruvespere alvenas tute nekonatan urbon en lando kie vi ne regas la nacian lingvon, kaj ne konas unu solan homon. Mi proponas ke ni fervojistaj esperantistoj — membroj de NEFA, petskribu al NSB, ke oni permesu al ni fiksi malgrandan tabulon en la stacidomoj, en kies proksimeco loĝas esperantisto. La teksto en tia tabuleto nur povas informi pri la nomo de helpopreta(j) gesamideano(j), adreso kaj telefonnumero. Per tia servo ni povas faciligi kaj certe ankaŭ agrabli la viziton en nia lando. Kion opinias nia membraro, kaj ankaŭ aliaj gelegantoj pri mia propono? Kiu anoncas sin helpopretaj? Mi estas scivolema kaj petas pri opiniesprimoj en «Fervoja Paĝo», kiel eble plej baldaŭ.

Per Johan Krogstie

Faka terminaro kaj uzitaj poŝtmarkoj

Mi memorigas pri la Fervoja Terminaro «Norvega/Esperanta — Esperanta/Norvega» kiu kostas 5 norv.kr., kaj kiun vi povas mendi ĉe mi. Mi memorigas ankaŭ pri uzitaj poŝtmarkoj por «Norvega Esperantisto», kiujn vi povas sendi al mi. Adreso: Kaldbakkstubben 22, Oslo 9. — Deĵoradreso: Vogndriften, Lodalen, Oslo Ø.

Odd Kolbrek

La dentrada fervojo en Budapeŝto

(De «Hungara Fervoja Mondo»)

Ĝi estis ekfunkciigata la 24an de junio 1874. Ĝi trafikis de la urbparto Városmajor sur la monto Sváb (nuntempe Szabadsághegy - Libermonto). Tio kaŭzis grandan ĝojon al la loĝantoj en tiu pejzaĝo, inter ili ankaŭ la fama romanverkisto Mór Jókai, kiu loĝis sur la monto Sváb, kvankam la trajnoj tiam trafikis nur somere, de la 25a de aprilo ĝis la 15a de oktobro ĝis la jaro 1910. Vaporlokomotivoj trakciis la trajnojn. Pro sekurecaj kaŭzoj la lokomotivo estis ĉiam ĉe tiu fino de la trajno, kiu estis pli proksime al la valo. En 1890 la linio estis plilongigata ĝis la monto Szechenyi. En 1929 estis enkondukata la elektra trakcio. Dum la dua mondmilito la fervojo estis grave difektata. De la 25a de decembro 1944 ĝis la 16a de junio 1945 ĝi ne funkciis. La malnovaj elektra trajnoj trafikis ĝis la 15a de marto 1973. Post la rekonstruo de la linio novaj trajnoj trafikis sur la linio. Post la modernigado la veturtempo grave mallongiĝis.

En la tempo de la vaporuzino la veturtempo estis al la monto 21 minutoj, nun, per la modernaj trajnoj, 18 minutoj. La vojaĝdaŭro al la valo estis 33 minutoj, nun 19 minutoj.

Okaze de la 100-jara jubileo, en 1974, estis malfermata ekspozicio en la Trafika Muzeo en Budapeŝto. Ŝtatsekretario en la ministerio por Trafiko kaj Poŝto, Kálmán Abrahám, malfermis ĝin la 25an de junio 1974.

Esperanta teksto en horaro

N.S.B. nun enkondukis klarigan tekston en Esperanto en la kajero, ekstrakto de la horaro, valida dum la periodo la de junio — 27a de septembro 1975.

Karaj NEFA-anoj!

Kore mi dankas pro la belaj floroj, kiuj estas donitaj al mi dum mia malsano.

Odd Kolbrek

Letero de Lapenna

(daŭr. de p. 71)

parolado dum tiu Kongreso, en mia eksiĝa letero, kiun la oficiala organo de UEA rifuzis publikigi, kaj en la verko «Hamburgo en Retrospektivo: dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca konspiro en UEA». Ĉiu povas mem juĝi surbaze de la publikigitaj materialoj.

Esperante, ke vi publikigos tiun ĉi leteron en la sekvanta numero de NE, mi restas kun esperantistaj salutoj,

via
Ivo Lapenna

La vojo hejmen

De malnova tempo, la mara vojo estis la ĉefvojo al Norda Norvegujo. En la tempo de la aŭtomobiloj, ĉiujare pli da homoj veturas la internan vojon, kaj ankaŭ ĝi donas tre varian kaj interesan vojaĝon. Fjordo, valo kaj montoj montras sin en ĉiam novaj panoramoj. Ĉifoje mi haltas 86 kilometroj norde de Narvik laŭ la ĉefvojo 6. Oni nun verŝajne plej bone memoras la lokon, ĉar la vojo tre akre kurbiĝas, kaj oni devas malrapide veturi se oni volas resti survoje. Krome la vojo estas tre bona. Oni grimpas supren trans montodorso sur ebena kaj rekta vojo. Ne ĉiam estis tiel.

La unuaj enloĝantoj norde de la montodorso Kobbergyggen venis tien dum la jaro 1791. Antaŭ tio nenio loĝis tie dum la tuta jaro, nur laponoj kampis en la valo dumvintre. Jon Kalbekken kaj Ole Brandvold kun siaj familioj venis pli ol mil kilometroj, de siaj hejmoj en la orienta parto de Suda Norvegujo por loĝigi la valon Bardu. Stranga idealismo kaj emo kulturi Norvegujon ilin allogis. Ili estis nek junaj nek malriĉaj. Ili foriris de bonaj kulturitaj kampoj kaj sekuraj hejmoj al la arbaro en Bardu, por loĝi en kabaneto kvadrata 3,5 metroj en ambaŭ direktoj.

Du familioj loĝis en la kabaneto la unuan vintron. La malfacilaĵoj estis grandegaj, kaj dum januaro 1792 mortis Sigrid Kalbekken, la edzino de Jon, la pli juna el la du dommastrinoj. Laŭ malnova kutimo ili volis enterigi sian karan ĉe preĝejo

en kristana tero. La plej proksima preĝejo estis en Ibestad, sur la insulo Rolla 85 kilometrojn for. Ili neniam iris tiun vojon, ĉar kiam ili alvenis al Bardu lastsomere, ili albordigis pli norde, kaj sekvis la riveron al sia nova hejmo. Nun ili tamen volis al Ibestad, kaj post la enĉerkigo, Jon kaj Ole ŝovis Sigrid sur glitveturileto sudokcidenten.

Veninte al Kobbergyggen neĝofalo densiĝis, kaj la polusa nokto mallumiĝis. Ili ne sciis kien iri. La malvarmo estis alia malamiko. Por ne perdiĝi kaj por teni la varmon dum la nokto, ili prenis sian manon ĉirkaŭ po unu pino, kaj ĉirkaŭeniris dum la tuta nokto. Kiam la mateno venis, ankoraŭ estis mallumo, sed la steloj estis videblaj kaj montris la direkton. Ili ne kuraĝis plueniri, sed pendigis la ĉerkon inter du pinoj por protekti ĝin de la rabobestoj. Reirinte al la kabaneto, ili restis tie dum ankoraŭ 3 monatoj ĝis la vojaĝo povis daŭrigi.

La enterigo okazis ĉe Ibestad komence de majo, kaj tiam okazis la unua konata vojaĝo trans Kobbergyggen. Familiano de Jon kaj Sigrid rakontis al mi pri tio, kaj la familio ankoraŭ loĝas en la bela paroĥo Bardu. Nun ili dum 150 jaroj havis sian propran preĝejon.

La malfacilaĵoj dum la unua vintro ne malkuraĝigis la enmigrintojn. Dum la venontaj kvin jaroj Jon kulturis farmon ĉe la kabaneto kaj lasis ĝin al sia plej aĝa filo. Tiam Jon edzinigis Marie, filino de Ole, kaj kulturis farmon pli proksime al Kobbergyggen.

Komence de la pasinta jarcento venis centoj da homoj el Suda Nor-

vegujo por kulturi la belajn valojn meze en Troms. Tie estas la hejmo de la nepoj.

Mi ofte veturis trans Kobbergyggen. Estas nun sekura loko, vintre kaj somere, pro la du pioniraj familioj kiuj trovis sian hejmon tie. La vojo hejmen estas la vojo antaŭen. Tiuj kiuj ne bedaŭras la pasintaĵojn sed daŭre iras, trovas sian hejmon, por si mem kaj siaj nepoj.

V.

INTERNACIA PREMIO

«The Whole World Highway»

REGULARO

La partopreno en la premio estas libera al ĉiuj poetoj el ĉiuj nacioj, kondiĉe nur ke la konkursaĵoj estu verkitaj en la ITALA LINGVO aŭ en la LINGVO ESPERANTO.

La Premio enhavas jenajn sekciojn:

- a) Por du poemoj neeldonitaj ĝis maksimume 80 versoj.
TEMO LIBERA.
- b) Por du poemoj neeldonitaj ĝis maksimume 80 versoj.
TEMO PROPONITA: «La paco kaj la kunhelpo inter la popoloj».
- c) Por volumo de poemoj eldonita antaŭ la 31a de Oktobro 1975.

La poemoj de la Sekcioj a) kaj b) devas alveni en SES klare tajpitaj kopioj, el kiuj nur unu devos surhavi la kompletajn nomon kaj adreson de la aŭtoro, la indikon de la sekcio en kiun oni partoprenas kaj la precizigon kiamaniere oni pagis la kotizon.

Ankaŭ la volumoj de poemoj por la sekcio c) estu senditaj en SES kopioj.

Ĉiuj konkursaĵoj devos alveni ĝis la 15-a de Decembro 1975, al la suba adreso:

Premio Internazionale
«The Whole World Highway»
Poŝtkesto n. 2,
1-22100 COMO-MONTEOLIMPINO

Por parta kovro de la elspezoj organizaj, poŝtaj kaj sekretariecaj estas postulataj jenaj kotizoj:

Sekcioj a) kaj b): 2000 italaj liroj aŭ egalvaloro.

Sekcio c): 3500 italaj liroj aŭ egalvaloro.

Norvego atingis premion

La rezulto de la Patrolkonkurso 1975:

ORIGINALA POEZIO:

- 1a «Malabsolvo»
de Aldo de Giorgi (Italio) p. 79
- 2a ex «Libro de l' arbaro»
de Elvira Lippe (Latvia) p. 77
- 2a ex «Eble»
de Lina Gabrielli (Italio) p. 77
- 3a «Montdesegno en blanka memoro»
de Kjell Walraamoen, Norvegio p. 75

ORIGINALA PROZO:

- 1a «Li nepre klarigadis la rilatan kialon» de Alfredo Perricone Pirandello (Italio) p. 74
- 2a «Vizito al milita aerhaveno» de Alberto Busato (Italio) p. 64
- 3a «Kosma konversacio» de Ljuba Jekova (Bulgario) p. 63

La oficiala premiado okazis dum la 46-a Itala Esperanto-Kongreso en Trieste la 16an de septembro 1975.

La premiitaj verkoj aperos enpremiere en la gazetoj «Literatura Foiro» kaj «L'Esperanto».

Korespondu!

Mi estas instruistino 29-jara, kaj mi serĉas amikinojn en via lando. Mi interesiĝas pri viva stilo, edukado, muziko, kaj mi kolektas bildkartojn. *Libuše Kloudová*, Jičínská 13, CS-742 58 PRIBOR, okres Novy Jičín, Ĉeĥoslovakujo.

Mi dez. kor. kun gejunularo de via lando. Mi estas 23-jara knabino, kiu interesiĝas pri ĉio. — *Szilágyi Gitta*, H-6060 TISZAKÉCSE, Rákóczi u. 51, Hungarujo.

36-jara ĉarpentisto en eksperiment-fabrike deziras korespondi. Mi estas edzo kun filino 6-jara, amas sporton kiel ŝakisto, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. — *Viljo Kolomainen*, Leningradskaja obl., Gatčina raion, 188353 ROMANOVKA, gep. Vekkelevo 5, U.S.S.R.

Dez. kor. *Aleksandr. Ekkel*, Vjatskaja 21, 310013 ĤARKOV, U.S.S.R.

Dez. kor. kun Norvegujo kaj la tuta mondo, kolektas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn, etiketojn de cigaroj, monerojn. — *Sebastião Pereira da Silva*, Rua José de Farias, 44. Mustardinha, 50 000 RECIFE, PE., Brazilo.

17-jara hungara gimnaziano, komencanto dez. kor. kun gejunuloj por trovi amikojn en via lando. Kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, etiketojn, alumetetiketojn kaj portretojn de filmgeaktoroj. *Francisko Szilvási*, H-4320 NAGYKALLO, Táncsics u. 22, Hungarujo.

Mi estas hungara lernantino 17-jara. Mi volus korespondi kun knabino. *Kurucz Ildikó*, József Attila u. 12, H-4200 HAJDUSZOBOSZLO, Hung.

Mi tre dez. kor. kun amiko en Oslo, per ilustr. poŝtk. kaj interŝanĝi fotoalbumojn. *Angel Angelov*, Str. Trepetlika n.ro 12-3, SOFIA 7, Bulgarujo.

25-jara civila inĝeniero, fraŭlo, tre ŝatus korespondi kun geesperantistoj el via lando. *David Correa Roldán*, Carrera 83 / 49E-52, MEDELLIN, Kolombio, Sud-Ameriko.

28-jara ĉeĥino dez. interŝanĝi bildkartojn kun esp.istoj en Skandinavio, Francujo, Britujo, Hispanujo k. aliaj. S-ino *Irena Michalova*, Trebickeho 784/II, 37701 Jindrichův Hradec, Ĉeĥoslovakujo.

Dez. kor. kun belega fraŭlino, studentino el Norvegujo, en Esperanto, franca, germana, angla — interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, glumarkojn, alumet-etikedojn, gazetojn, *Fráňa Škrļa*, Ĉelakovského 486, CS-697 01 KYJOV, Distr. Hodonín, Ĉeĥoslovakujo.

Grupo de polaj 17-jaraj gcesperantistoj, kiuj lernas Esperanton en la urba liceo «Ludoviko Zamenhof» dez. kor. kun gesamaĝuloj. La adreso de la grupo estas: Esperanto-grupo ĉe Zamenhof-liceo, str. Kruczkowskiego 4, 93-236 LODZ, Pollando. Inter tiuj du junulinoj aparte petis anoncon. Ili precipe interesiĝas pri literaturo, arto, lingvoj, k. kolektas bildkartojn. Ili estas *Halina Kotulska*, str. Tatrzańska 188 a, Lodz 93-239, kaj *Izabela Sawoyka*, strato Makuszynskiego 3 m 41, Lodz 93-248.

Norvega Kroniko

KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

La 11an de Junio okazis la tradicia kluba ekskurso al la somerdometo de Eva kaj C. Støp-Bowitz, kie ni en la belega vetero travivis agrablajn horojn. Ni manĝis kolbasojn kun apartenajo kaj trinkis kafon kun kukoj. La prez. donis kelkajn informojn i.a. pri la rondveturo de Justin Minani, pri la kluba donaco al Fondaĵo Canuto — rezulto de la kluba loterio dum klubkunveno — kaj pri premio, kiu estas donata de Hispana Esperanto-Muzeo — Klara Silbernik — al helpemaj edzinoj de esperantistoj. La patrino de la prezid., s.ino Antonia Criach, ĝin ricevis. C. Støp-Bowitz informis pri la norveglingva libreto «2500 mil med hurtigruta», pri Esperanto-aŭtomobilklubo kaj referis leterojn de esperantistoj restontaj en Oslo survoje al Tromsø.

Partoprenis 35 anoj kaj 1 gasto.

Raportis Odd Kolbrek.

En la jam tradicia mezsomerekskurso, la St.Johanan vesperon al la somerdometo de Else Bugge-Paulsen ĉe la Tyrifjordo, partoprenis 24 membroj kaj 15 gastoj, i.a. D.ro W. Borman kun siaj edzino kaj gefiloj. S.ro Borman estas ja, same kiel C. Støp-Bowitz, vicprezidanto de U.E.A., kaj lia filo Tomas Borman estas bona esperantisto. Krome partoprenis s.ino Grosser el Berlino kune kun sia neesperantista amikino. Belega estis la vetero, kaj ni admiris la belegan

fajron dum en la kuirejo nia gastigantino kaj ŝiaj helpantinoj preparis bonajn manĝaĵojn, kuiris kafon kaj pretigis belajn tablojn ornamitajn per sovaĝaj floroj. Inter la gastoj ankaŭ estis filo de s.ino Herlofson kun sia edzino. Li faris belan paroladon al nia gastigantino dum la kafotrinkado. Poste ni ekstere ludis, dancis kaj kantis akompanataj de E. Wollebæk, C. Støp-Bowitz, R. Grotmål kaj O. Prytz. S.ro Murak rakontis amuzan historion pri ostroj, C. Støp-Bowitz imponis nin per fajroteĥnikaĵoj, kaj niaj akompanantoj laŭvice kantis laŭ propra akompano. Post etosoplina St. Johana vespero ni, dezirante bonan someron kaj ĝis revido en Tromsø, disiĝis.

Raportis Pepita de Caspary.

3/9. La prez. bonvenigis al nova laborsezono. C. Støp-Bowitz parolis pri la 60a Universala Kongreso, kiel oficulo spertis ĝin. I. a. li priparolis la bonegan organizadon, la akcepton kiu, por la 60-a, okazis en Frederiksberg, kiu situas kiel propra komunumo en Kopenhago, okazis tiamaniere, ke unu parto de la kongresanoj akceptiĝis ĉe la urbestro en la urbdomo en Frederiksberg kaj samtempe la alia parto sammaniere en Kopenhago. Plue li i. a. priparolis, ke la direktoro de Unesko sendis salutleteron, ke la virina jaro estis la ĉeftemo, la fakajn kunvenojn, la grave plibonigitan financan staton, ke Rolf Bugge-Paulsen estas inter la 7 novaj honoraj membroj de U.E.A., k.t.p. Ragna Jacobsen parolis pri siaj impresoj de la 60-a, i.a. pri la solenaj malfermo kaj fermo de la kongreso, pri la salutoj — de

N.E.L. salutis Otto Prytz —, diservo gvidata de Hans Amund Rosbach, prelego de C. Støp-Bowitz en la somera universitato, la artaj prezentaĵoj, k.t.p. Fine ŝi diris, ke la partopreno estis granda travivaĵo. Pri la ĉi-somera agado de Skolta Esperanto-Ligo parolis John Berggreen. Kompreneble aparte pri la ĵamboreo en Lillehammer, dum kiu oni pere de faldfolioj, lernolibroj kaj bonega ekspozicio propagandis inter la 18 000 partoprenantoj de 91 landoj — 600 norvegoj. Ankaŭ en la ĵamborea gazeto aperis artikoloj. Montriĝis ke ekzistas grandaj lingvaj malfacilaĵoj dum la ĵamboreo. La ekspozicio montriĝis poste dum la 60-a, dum konferenco inter skoltestroj, kaj J. Berggreen montris ĝin dum la klubkunveno.

Vendiĝis libroj por 128,60 kr.

Raportis Odd Kolbrek.

★

KORESPONDU!

Hungara komencanto, 20-jara studento, dez. kor. kun norvego. Interesiĝas pri politiko, moderna muziko, sporto, fotografio, lingvoj, homoj. — *Schler Sándor*, H-1045 BUDAPEST, Nyár u. 82/A, Hungarujo.

Ĉu vi volus havi geamikojn en Pollando? Se jes, vi skribu al mi! Mi estas 28-jara edzino kun filineto. — *Isabella Romana*, I.R.T. Ittakowicz-Krysiak, ul. Inowroclawska 54/19, PL-53-648 WROCLAW, Pollando

Usonano loĝanta en Islando deziras kolekti komikaĵojn (tegnoserier) el norvegaj ĵurnaloj. Mi pagos la poŝtkostojn. Mi deziras kontakti iu(j)n, kiu(j) volos tranĉi el la ĵurnaloj. — *Roger A. Budnick*, Freyjugata 25, Reykjavík, Islando.

Du polaj junulinoj 17-jaraj esperas ligi longan, bonan korespondadon. Ni interesiĝas pri lingvoj, pensoj de homoj, proverboj. Pasiigas nin vojaĝoj, ni esperas viziti fremdajn landojn. *Hanna Abramowicz*, ul. Potockiego 45/3, PL-51-153 WROCLAW — kaj *Malgarzata Hamala*, ul. E. Orzeszkowej 66/9, PL-50-311 WROCLAW — Pollando.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10030
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo:

Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 32

ESPERANTOFORLAGET A/S (*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10031
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

La redakcio:

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon: 776 20

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal